datum 1. juni '47
Nederlandse 6de jaargang
n. 7

# P A C O kaj J U S T E C O

Monata revuo de la grupo B r u g g e.

SEKCIO DE
FLANDRA LIGO
ESPERANTISTA

. Prezidanto : Drs F.Roose, J.& M.Sabbestr.12,Brugge-Tel. 31981
. Sekretariejo :Iserentant R., Steenweg op Blankenberge,86,Brugge
. Interŝanĝo : Maertens Grég., Nieuwstraat, 54, Assebroek
. Poŝtkonto : 291429 - Maertens Grég. Assebroek.

## V A R I A Ĵ O J .

### 1. OPINIO PRI PLIRIĈIGO DE NIA LINGVO.

Frits Linden, en Svenska E° Tidningen - Aprilo 1947, p.47 : "..... oni devas trovi oportunajn tradukojn de ĉiuj nacilingvaj vortoj en ĉiuj kampoj de praktika vivo kaj kulturo, kiom eble utiligante nur la ekzistantan vortprovizon (substreko de ni N.d.l.r.) elpuŝante tamen pli malpli monstrajn kunmetaĵojn sed akceptante ĉiam jam tute internaciajn esprimojn".

Ni tute samopinias, aldonante tamen ke, laù nia opinio, oni kutime faras monstrajn kunmetaĵojn kiam oni metas tro da ankaù ne bezonataj afiksoj. Sub la vortoparo "tute internacia" la aùtoro komprenas ne nur "de ĉiuj popoloj uzata" sed ankaù "de ĉiuj sociotavoloj uzata". Kaj ankaù en tio li pravas. Li tial rekomendas ekz. la uzon de "kanguruo" anstataù "makropo", de "kobro" anstataù "najo". Mi tamen ne scias ĉu "blanka akvolilio" anstataù "nimfeo" kaj "flava akvolilio" anstataù "nufaro" estas konsilinda. Tio estas tre delikata afero. Pri tio decidos plej bone scienca persono kiu tamen ankoraù ne perdis la "saman komunan pens-kaj esprimmanieron.

### 2. KIAL E° NE ESTAS ŜATATA DE AUTORITATULOJ KAJ POLITIKISTOJ ?

La sama Frits Linden en la sama n° donas sian originalan opinion pri tio ".....ili malpermesis esperanton, ĉar ili trovis ĝin tro perfekta. Same aliaj pli malpli strebemaj popolgvidantoj malfavoras esperanton pro ĝia granda perfekteco por ĝia celo. La celo de E° nome estas ke ĝi fariĝu la dua lingvo de ĉiuj homoj en la tuta mondo. Sed tia lingvo rompus la malbonajn intencojn de strebuloj. Ili volas dividi la popolojn por regi ilin. Ju pli izolitaj estas inter si la popoloj, des pli bone la potencpolitikistoj povas eraigi la homojn kaj nebuligi al ili la okulojn. Kaj des pli bone ambiciuloj povas akapari al si la gvidantajn postenojn sur diversaj kampoj de ekzistantaj rilatoj internaciaj".

### 3. ĈU PAROLI EN ESPERANTO ?

Antaù kelkaj monatoj ni priparolis ĉi-tie la demandon "ĉu paroli en E° ankaù en nia propra lando". Ni faris tion okaze de artikoleto en "Nederlanda Esperantisto" kaj alia en "Flandra Esperantisto". Ni respondis tiun demandon jese koncîce ke ni dece kaj ne fanfarone tion faru. Ni ĝojas ke ni trovas konfirmon de nia vidpunkto ankoraù ĉiam en la sama n° de "Svenska E° Tidningen". Tie S-ro E.Hult skribis i.a. : "... .... kion ni faras por pruvi al la homoj ke E° estas la plej taùga rimedo por kontentige solvi la mondlingvan problemon ? ĉu ni en la praktiko montras al la publiko ke ni mem kapablas perfekte kaj flue paroli ĝin ? ĉu ni cetere ne malzorgas multajn okazojn por buŝe ekzerci la lingvon ?...

4. LA PETSKRIBO AL LA U.N.O.

Antaù mi kuŝas la maja n° de "Esperanto". En ĝi mi legas la monatan raporton pri la petskribo. Kaj kion mi konstatas ? ke ĝi iĝos terura fiasko, kvante kaj kvalite. La kompleta nombro estas mokridinde malalta. La demokratia (?) Rusujo eĉ ne estas menciata. Do tie estas preskaù neniu plu kiu ankoraù interesiĝas pri Esperanto (?). Kaj kion montras la aliaj landoj ? ke la tieaj gesamideanoj tute ne penas por tiu afero. Eble ni povas escepti du aù tri landojn. Tiu-ĉi raporto estas ankaù speciale interesa ĉar ĝi prezentas liston de eminentuloj kiuj subskribis la bileton. Je mia tre granda miro estas multegaj nomoj de eminentuloj kiujn mi ne vidas kvankam la E° gazetaro depost jaroj anoncis ke ili estas tre favoraj al nia afero. Kie restas Schusschnig ? Kie Beneŝ ? Kie la multaj Nederlandaj episkopoj ? Belga Ligo tiel longtempe fieris kiel pavo ĉar la eksreĝo Leopold III estis (estas ?) ĝia honorprezidanto. Kie estas lia subskribo ? La papo benis diversfoje la Katolikan E° movadon. Ĉu Li ankaù ne foje subskribu la petskribon ? Rigardu la programon de tiom da internaciaj kaj naciaj kongresoj. Honorkomitatoj... belegaj. Kaj nun, iliaj subskriboj ? La E° movado... multe da ŝajnigo kaj multe da fanfaronado !

5. S-ANO MIRIN DAĴO.

"Flandra Esperantisto" de Aprilo 1947, kiel boksisto, donas "direkton" en la stomako de la Universala Ligo. La pikeca "Pik" mokas pri la nevundebla homo Mirin Daĵo kiu estas ne nur nevundebla sed ŝajne ankaù nevidebla. Cu ĝi volas ankaù moki pri la gesamideanoj kiuj kredis la tiurilatan anoncegon en "La Praktiko" ? Fakte tiuj gesamideanoj kredis en famaj nomoj kaj meritplenaj personoj kiel Dr Privat, Pastro Cseh, S-ino J. Isbrücker. Oni malfacile pensas ke tiuj tri lastaj kunlaborus al iu "chantage". Ni do atendas de ili konfirmon pri tiu Sro Mirin Daĵo.

6. FOR LA NEÙTRALECON ?

Tio estas la titolo (sed kun ekkria signo anstataù demanda signo) de la ĉefartikolo en "Espero Katolika", maja numero 1947. En tiu ne subsignita artikolo ili ripetas je la, mi ne scias kioma fojo, samajn antaùajn diraĵojn, ĝeneralajn veraĵojn (kiel ekz. ke vera neùtraleco estas malfacila; ke neùtraleco por Katolikoj ne estas sen riskoj k.t.p.) kaj sofismojn, Depost tiam ni jam pli ol sufiĉe pruvis ke neùtrala E° movado havas ekzistrajton kaj labordevon en kiu ankaù la Katolikoj devas partopreni. Neniam ni vidis respondon aù bonan kontraùargumenton de niaj tezoj. Cu ili neniam legis niajn sendaĵojn ? Cu ili ne kapablas kompreni ? Cu ili ne havas intereson por la ideoj de tiuj kiuj staras ankaù en la neùtrala movado ? Ni ne scias. Sed ĉiuokaze tiu artikolo estas denove pruvo pri ilia etcerbuleco.

7. EC PIEDPILKKONKURSO DONAS ARGUMENTON POR ESPERANTO !

Sabaton, la 10an de Majo okazis en la kolosa stadiono de Glasgow, la piedpilkkonkurso Granda Britujo-Eùropo, kiun la unuaj gajnis per la troaj ciferoj de 6-1. La 5an celpunkton faris la Italo PAROLA kontraù propra dekunuopo. Li volis transdoni la pilkon al DARUI kiu jam estis forlasinta sian kaĝon kaj la "leda afero" ruliĝis trans la fatala linio.
Jen kion PAROLA klarigis pri tio. "Mi kriis al Darui ke mi transdonos la pilkon al li, sed li komprenis ke li devis alkuri por kapti ĝin". Kion oni diros pri tio ? La Italo devis koni la Francan lingvon ? Kiu rajtas devigi lin ? cetere la Franca lingvo jam perdis multe de sia eminenta pozicio. Same la Franco ne devas koni la Italan lingvon. Sed ambaù devus koni Esperanton. Depost nun la E° flago kiu flirtas en la Amsterdama stadiono dum internaciaj Konkursoj ne nur estos simbolo... sed ankaù averto !

8. LA ELPAROLO DE "E" KAJ DE "O".

"Nederlanda Esperantisto", 30 April 1947, publikigas artikolon pri tiu temo, okaze de letero enveninta kaj pritraktanta tiun temon. Ni lernas tie ke Dro Zamenhof ne faris precizajn regulojn. Li mem elparolis tiujn vokalojn malfermite ("e" kaj ne "ee"; "o" kaj ne "oo"). La konata Franca pioniro Markizo Louis DE BEAUFRONT elparolis ilin fermite ("ee" kaj "oo" per duonfermita buŝo) Dro Edmond Privat rekomendis imiti la Zamenhofan ekzemplon. Sed li mem ne estis tute logika. Li ne ĉiam elparolis la du menciitajn literojn laù tute sama maniero. En tiu artikolo ni vidas ke en ĉiuj Nederlandaj lernolibroj staras ke oni elparolu la "e" kiel en "pet" kaj "mes". Se tio estas vera tiam estas plia eraregο en la vico de la ne malofta j eraroj kiujn ni jam vidis rilate la elparolon de literoj. Efektive estas ne kiel en tiuj du Nederlandaj vortoj sed jes kiel en la vortoj "vilt" kaj "Bilt" ke la anoj de la malfermita parolmaniero elparolas la "e". Plie, ni aldonas ke verŝajne neniu estas tute logika kaj unutona (aù monotona) en tiu afero. Efektive estus tro kontraùnature se oni volus devigi elparoli tiujn du sonojn laù ĉiam sama maniero. Oni neniam atingus tion.Kaj la ĉefa afero : tio ne malhelpas ke fremduloj sin reciproke tre klare komprenas; pro tiuj du aliaj reguloj : akcento ĉiam sur antaùlasta silabo kaj ĉiam sama finaĵo de la vortoj.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

Rezulto de dujara Esperanto-Laboro en la nova Aùstrio

Pasis jam du jaroj de la tago, kiam inter la brulantaj ruinaĵoj de Vieno la Esperantistoj kunvenis por rekonstrui la Esperanto-movadon.La rezultoj de la dujara laboro estas jenaj :

1. Rekolekto de la aùstria samideanaro;
2. Refondo de la unueca aùstria Esperantista organizo "Aùstria Esperantista Federacio", kiu estas superpartia;
3. En la kadro de AEF organiziĝis ĝis nun 56 grupoj : 2I en Vieno kaj 35 en la federaciaj landoj;
4. Reaktivigo de plu-aj fakaj grupoj, ekzemple : "Laborista", "Katolika", "Poŝtista", "Fervojista" (aliaj en preparo);
5. Kreo de Esperanto-Centro (oficejoj kaj informejo) Wien, I., Neutorgasse, 9;
6. Eldono de la oficiala organo de AEF : "Aùstria Esperanto Revuo";
7. Reaktivigo de la "Aùstria Esperanto Instituto";
8. Fondo de "Aùstria Esperanto Servo" por praktika aplikado de Esperanto;
9. Fondo de "Aùstria Societo de Amikoj al Esperanto";
10. Eldono de la oficiala organo de la "Aùstria Societo de Amikoj al Esperanto" la gazeto "Der österreichische Esperantist", kies nova nomo estos de nun "Welt im Wort";
11. Eldono de instrua kaj ekzerca revuo "Die Weltsprache", t.e. La Mondlingvo;
12. Eldono de senpage disdonata propagandcela "Murgazeto";
13. Fondo de Esperanto-Eldonejo "Tramondo";
14. Remalfermo de la "Internacia Esperanto Muzeo" en Wien-Hofburg;
15. Malfermo de "Viena Esperanto Seminario" (altgradaj Esperanto-kursoj);
16. Enkonduko de Esperanto kiel nedeviga instrufako en diversgrandajn lernejojn;
17. Esperanto kursoj en diversaj Popol-Altlernejoj;
18. Esperanto Lektoratoj en la Teknika-Mondkomerca-kaj Agrikultura-Altlernejoj;
19. Restarigo de la Ŝtata Ekzamenkomisiono por Esperanto;
20. Esperanto-Kurso en Radio (Ravag) Wien, sendilo Wien I, 506,8 m., ĉiumerkrede 06,35 - 06,45;
2I. Esperanto-Radio-Inform-Servo : sendilo Wien II, 30 m, 4I, kaj 228,6 m., ĉiuĵaude 17,50 - 17,55;
22. Aperigo de 57 informaj artikoloj kaj 312 notoj pri la Esperanto-movado en la germanlingva gazetaro de Aùstrio.

Raimund Cech.

Ni speciale direktas vian atenton al la Radio-sendaĵoj (ciferoj 20 kaj 2I) kaj petis vin, instigu viajn legantojn al aùskultado; ili nepre skribu aprobajn leterojn al Ravag Wien-Austrio, IV., Argentinierstrasse 30a, por ke Radio Wien eksciu eĥon eksterlandan.

Samideane salutas vin

Dro Leopold Grimme.

# LA TERO.

Ke la tero estas globo, izolita en la universspaco, estas fakto pri kiu neniu plu diskutas depost kiam oni transiris ĝian supraĵon en ĉiuj direktoj. Ĝi estas nenie kaj per nenio subtenata aŭ tenata. Neniam vojaĝantoj sur tero aŭ maro trovis ie apogon. Ankaŭ la aliaj ĉielkorpoj kiel la suno, luno, steloj, planedoj, estas globformaj. Kaj precipe tiu ideo ke la tero estas subtenata per io, estas jam absurda, ĉar kiamaniero tiuj subteniloj estus subtenataj ? Antaŭe oni imagis ke la tero estis subtenita per fortaj kolonoj, kaj tiuj kolonoj denove per elefantoj kaj tiuj elefantoj per imponegaj testudoj. sed poste ? Tiamaniere oni konkludis al io alia. Ni nun scias ke, kie ajn ni troviĝas sur la tero ni ĉiam havas la piedojn sub ni, malsupre estas ĉo la interno de la tero kaj la ekstero estas por ĉiuj loĝantoj de la tero, ĉio kio troviĝas super nia kapo. Ni do devas imagi la teron ŝvebanta en la universo sen iu subtenilo. Ĝi eĉ ne ripozas sur iu gasstratuso aŭ fluidaĵo. Ke oni nur malfacile povis kompreni tion estas nur ĉar oni havis tutan malbonan komprenon pri la pezo-forto. La historio de la astronomio en la pratempoj montras al ni, ke la unuaj observantoj kiuj komencis pripensi la ebleeon ke la tero kapablas stari sur si mem, nur hezitante kaj malrapide transiris al la realo, ĉar ili ne povis imagi al si, ke tiu peza globo, sur kiu ni moviĝas, ne falis.

La plej antikvaj astronomoj el Chaldea imagis la teron malplena kiel ŝipo kaj kredis ke tiamaniere la tero povis flosi en la profundaĵo de la akvoj. Aliaj opiniis ke ĝi ripozis sur la aksoj de ambaŭ polusoj. Aliaj denove opiniis ke ĝi senlimito etendiĝis sub niaj piedoj. Cielkorpo nur povas fali kiam ĝi estas altirita de alia korpo. La diametro de la tero estas 12.732 kilometroj. La mezlongaj homoj mezuras 165 centimetrojn, do imagu al vi formiko, flanke de la plej alta turo !

Ĝi estas ĉirkaŭita de aerstratuso, la atmosfero, kies korpulenteco estas pli ol cent kilometrojn. Tiu atmosfero havas la bluan koloron. En tiu vagas la nuboj sur diversaj altaĵoj, variante inter 800 kaj 10.000 metroj. Tiuj nuboj donas je kovrita aero la strangan ovalan formon al la ĉielo kaj tiam la firmamento ŝajnas al ni multe pli proksima kaj kvazaŭ ripozanta sur la tero. Se la atmosfero estus trarigardebla ni tute ne havus la ĉielarkaĵon; ni vidus tiam la stelojn tiel bone tage aŭ nokte, ĉar ili estas ĉiam en la firmamento. Pere de astronomiloj oni povas rimarki ilin je tagmezo. La ĉirkaŭaĵo de la tero estas proksimume 40.000.000 metrojn. Oni ankaŭ provis pezi la teron kaj oni venis al la konkludo ke ĝi pezas : 5.875.000.000.000.000.000.000.000 kilogramojn. Kvankam ĝi ŝajnas malegala per la montĉenoj, ĝi tamen estas preskaŭ regula. La alteco de la plej altaj montoj ne estas mila parto de la diametro de la tero kaj ankaŭ neniu profundeco de la maroj atingis la milanparton de la diametro. Kaj oni nun diros : jen, estas tamen granda diferenco inter la tero kaj la steloj. La tero estas malsupre, la steloj supre; la tero ne estas lumdonanta kaj la steloj tamen; la tero estas granda, la steloj malgrandaj; la tero estas peza, la steloj ŝajnas tre malpezaj. Sed tio estas nur ŝajno. Fakto estas ke la tero brilas al la ĉielo kvazaŭ stelo. Ĝi tamen rebrilas la tutan lumon en la universspaco; kiun ĝi ricevas de la suno.

Vidate de el la suno, ĝia supraĵo estas 14 fojojn pli granda kaj ĝia lumo 14 fojojn pli forta ol la lumo kiun la luno nokte rebrilas sur la tero. Vidate de sur Mars, la tero estas bela vespera kaj matena stelo, kiu faras la saman impreson kiel Venus por ni. Vidate de sur Venus kaj Mercurius, ĝi brilas nokte al la ĉielo kiel Jupiter por ni. La planedoj kiuj brilas al la ĉielo kiel steloj kaj eĉ pli, estas de si mem tiel malmulte lumdonantaj kiel la tero; ni vidas ilin nur ĉar la suno lumigas ilin. La lumo de la suno disvastiĝas sin tra la firmamento sen lumigi ĝin, tiel por la tago kiel por la nokto. La planedoj kiel la tero, Mars, Venus, Jupiter, k.t.p. kaj ankaŭ la luno kaptas tiun lumon, kaj nur per tio ili brilas al la ĉielo. En realeco do estas nek la luno, Mercurio, Venus, Mars, Jupiter, Saturnus, Uranus aŭ Neptunus, pli lumdonantaj el la tero.

La kalkulo lernas ke tiuj mondoj estas kompareblaj en pezo kaj grandeco kun la tero. Kelkaj kiel la luno, Mercurio, kaj Mars estas pli malgrandaj. La aliaj kiel Uranus, Neptunus,

Saturnus kaj Jupiter estas pli grandaj ol la'tero. Jupiter ekzemple estas sole jam 1300 fojojn pli granda ol la tuta tero. Jupiter pezas ankaŭ 318 fojojn pli ol la tero. La ŝajno estas do tre trompema ! La diametro de la suno estas 109 fojojn pli granda ol tiu de la tero kaj ĝia pezo 333.432 fojojn. La suno estas malproksima de ni je ĉirkaŭ 12.000 fojoj la diametro de la tero. La volumo de la suno estas 1.295.029 fojojn tiel granda kiel tiu de la tero. Do la suno estas 150.000.000 kilometroj malproksima de nia tero. Se do la suno devus ĉirkaŭiri la teron en 24 horoj ĝi devus moviĝi laŭ rapideco de 9.000 kilometroj en unu sekundo.

La plej proksima stelo estas 280.000 fojojn pli malproksima ol la tero de la suno. La tero do moviĝas en 24 horoj ĉirkaŭ la akso kaj unu fojon en unu jaro ĉirkaŭ la suno.

Laŭ la verko "Hemel en Aarde" de Flammarion
en la Flandra tradukis : R. JURION.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

## V A R I A Ĵ O J .

9. ESPERANTISTARO = FAMILIO ?

En unu de la lastaj numeroj de tiu-ĉi gazeto ni notis kun plezuro ke la internacia Esperantistaro restis granda familio. Tion montris la multaj artikoloj pri nia sintenado rilate germanajn esperantistojn. Ni faris tamen demandon ĉu ĝi restus tia familio se ĉiu konus la politikajn kaj aliajn konvinkojn de la aliaj gesamideanoj. Kaj jen kiuj novaĵoj intertempe atingis nin. "Sudhungarlanda stelo" estis malpermesata ĉar ne ĉiuj kunlaborantoj donis sufiĉan garantion pri kontraŭfaŝismo (!) - En la maja numero de "Flandra Esperantisto" PIK raportas pri E° gazeto kiu agitas por "zorga esplorado de ĉiu esperantisto" kaj por "purigo de niaj vicoj per la forigo de ĉiuj maldemokrataj individuoj" - "Heroldo de E°" skribis antaŭ nelonge "prijuĝante situacion de germanoj, oni ne forgesu ke ili posedas tiom ekstreme malgrandan vivospacon" - "Esperanta" de 28.3.47 el Ceĥoslovakujo nomos tion "Hitlerana aserto" -

Ne, kara "Esperantista" ĝi estas tutsimple fakto ! fakto kiun fiuzis la Hitleranoj por propagandi. La sama numero donas tradukon de Ceĥa artikolo en kiu Sro Schumacher estas nomata "nova ratkaptisto". Tamen, laŭ nia scio, tiu persono tre, tre multe suferis sub nazireĝimo kaj estas nepra principohomo - la sama revuo en sia numero de 15.3.47 priparolante "Heroldon", diras i.a. "Precipe el la Rusa zono venas malmultaj sciigoj ankoraŭ. Tial oni parolas sole sur bazo de hipotezoj"; ĉu "Esperanta" ne komprenas ke ni, Okcidentanoj, trovas tion tre stranga ? ĉu "Esperanta" ne povas doni al ni klarigon pri la stranga sinteno de Rusa registaro je nia movado ? se la sama okazus ĉe ni (ĉu fakte ne la sama okazis ?) kiun juĝon "Esperanta" eligus ?

Jes, karaj gesamideanoj, ne rilate la lingvon sed rilate la internan ideon, gravaj danĝeroj minacas nian movadon !

10. DENOVE INTERESEGA KONFERENCO.

En "Franca Esperantisto", de Aprilo 1947, Sro Pierre Petit anoncas ege interesan internacian konferencon kiu okazos en Parizo dum Pentekosto 1948, sub la ĝenerala titolo "Monddebatoj". Ni citas :

"du konceptoj de la vivo sin prezentas al la popoloj, al la individuoj : la okcidenta kaj la orienta, la liberala kaj la komunista, la opa kaj la individua. Cu ni devos elekti inter ili? Cu eĉ ni povos elekti ilin? Cu estas ebleco por trovi sintezon inter la du konceptoj ? Cu estas eble trovi tiun sintezon pere de la ordinaraj ŝtataj diplomatoj aŭ ĉu ne estas pli oportune lasi al la popoloj mem la zorgon ĝin eltrovi ? Cu tiu eltrovo estos faciligata per la uzo dum la diskutoj de la komuna popollingvo Esperanto ? Jen la demandoj, kiujn kun seriozeco kaj eĉ fiereco, ni prezentos al la reprezentantoj de la diversaj popoloj, kiuj konsentos partopreni nian Konferencon.

"Al Statestroj, al parlamentanoj, al reprezentantoj de la ekonomiaj fortoj : industriistoj, komercistoj, sindikatanoj, al famaj sciencistoj, al kinistoj, teatraj artistoj, beletristoj, ni prezentos la necesajn demandojn. Ili donos al la partoprenontoj de la konferenco siajn opiniojn pri la diversaj pridiskutotaj temoj. Tiamaniere, ni esperas, laù nia povo, helpi nian malbenatan nunan mondon, foriri el la nuna ĥaoso, kiu devige kondukas nin al nova milito kaj al ĝenerala tutmonda detruo.

"Jen nia unua celo. La dua estas - kiam oni scias, ke ekzistas en la mondo certaj fantaziulоj kiuj, parolas serioze pri la diversaj projektoj, de universala lingvo, kiel Occidental, Basic English aù Interlingua de IALA - montri al la publiko franca kaj internacia, ke Esperantistoj nur povas organizi tian konferencon, kun la certeco ke, el multaj landoj venos fakuloj pri tiuj gravaj temoj, kiuj pritraktos ilin nur per unu lingvo : "Esperanto". Ni amike kaj larĝanime oferos al la kelkdekoj da occidentalistoj, ialanoj, basic-angliĉanoj kaj al la lasta idisto partopreni nian Konferencon. Ili tiel havos ideon pri la diferenco inter la vivanta lingvo de vivanta popolo kaj la amuzaj lingvaj studadoj de kelkaj klerulоj.

"Proksiman monaton, ni detale donos al vi la konsiston de la Komitato kaj de la komisionoj de la Konferenco. Tuj, vi sciu ke la kvar prezidantoj de la preparaj komisionoj estas :

por la politika, Sro Emile VANRULLEN, Kvestoro de la Konsilantaro de la Respubliko, kiu partoprenis en 1939 la someran esperanto-lernejon de G.E.E.; por la ekonomia, Sro Jules JULIEN, deputito de Rhône, eks-ministro, Prezidanto de la Respublikana Komitato por Industrio, Komerco kaj Terkulturo, al kiu ni ŝuldis en 1938, la esperantajn teatrajn radio-dissendojn; por la scienca Sro Aimé COTTON, Vic-Prezidanto de la Franca Akademio pri Sciencoj; por la intelekta, Sro Rektoro PARISELLE, al kiu ni ŝuldas la sukcesan tiel nomitan "eksperimenton de Besançon".

Por sukcesigi la Konferencon, ni bezonas, por pagi pluan salajratan sekretarion aù sekretariinon 10.000 FR. monate dum unu jaro ekde majo proksima. Ni petas vian helpon : ke ĉiu el vi, kiu deziras fariĝi "subtenanto" de la Konferenco promesu al ni sendi ĉiumonate, dum unu jaro, por la Konferenco, saman sumon (50 fr. 100 fr. 200 fr. 500 fr. aù 1000 fr., la minimuma sumo estas 50 fr.) Ni donos, en nia proksima numero, la unuan liston de la KONFERENCAJ SUBTENANTOJ. (La aliaj esperanto-gazetoj bonvolu afable represi tiun unuan alvokon por la Konferenco)."

Ne estas la unua fojo ke okazos interesega konferenco. Ni scias ke la antaùaj estis ankaù bonegaj. La raportoj atestas pri tio. Nur unu rimarko. Ĉu Pentekosto estas la plej taùga dato ? Okazas tiam multaj kongresoj. Kaj ne estas sufiĉe da libertempaj tagoj je tiu momento. Ĉu ne plu eblas ŝanĝi la daton ?

---

## J U N I O - B O T A N I K I S T O.

Inter la grentrunkoj, kiuj nun ankoraù estas verdaj, kreskas multaj unujaraj plantoj de kiuj la Cejano (Korenbloem = Centaurea Cyanus) estas la plej konata.

Oni povas ankaù rimarki ke la cejano estas de la familio de la Kompositacoj (Composieten) t.e. ke la tiel nomita floro estas aro de malgrandaj floretoj. Oni scias ke estas kompositacoj kiuj posedas tubformajn florojn kaj rubandformajn florojn; la cejano nur posedas tubflorojn.

La cejano posedas nur malmulte da folioj kiuj estas malgrandaj kaj krom tio okupita de haroj; tio al ni komprenigas ke la cejano estas planto kiu povas kreski sur sekaj terenoj. Multe da malgrandaj folioj faras ke oni ne havas multe da vaporiĝo kaj la haroj ankaù malhelpas tion.

Post la cejano la papavo ( Papaver Rhoeas - klaproos). La papavo venas de Hindujo kaj oni ĝin povas trovi ĉe ni en la grenkampoj sed ankaù en la riveretoj kaj precipe laùlonge de la fervojoj. Kiu volas vidi la malfermiĝon de la papavburĝono devas frue ellitiĝi ĉar tio okazas je la kvina horo. Linneus, la granda botanikisto, faris liston de la malfermiĝo de multaj florburĝonoj kaj la papavo estas la floro kiu malfermiĝas la plej frua. La planto posedas blankan sukon kiu estas veneno. La sukon de la hinda papavo oni vaporigas ĝis opio el kio venas la morfino. La semo donas dormigadmedikamenton sed estas iomete venena.

Dabrigas. Verkis Gilbert Brugorel.

# !!!! ANGULO DE LA SERĈEMULOJ.!!!!
!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!

SILABENIGMO. (6 puentoj)
El la subaj 50 silaboj, formu 25 du-silabajn vortojn laŭ jenaj difinoj :
1. homa korpoparto - 2. trinkaĵo. - 3. infekta malsano - 4. vivkunulo - 5. senvesta - 6. sovaĝa porko - 7. parto de la tago - 8. leviĝanta akvo - 9. fiŝkaptilo - 10. malmolaĵo en la korpo - 11. fama monto en Sicilio - 12. gravega ĉiela korpo - 13. signo de pulmo-malsano - 14. arbo - 15. punigilo - 16. frukto - 17. staranta akvo - 18. skrapi la kampon - 19. kreskaĵo kun manĝebla radiko - 20. marherbo - 21. marborda sablomonteto - 22. rivero en Hispanujo - 23. multfoje - 24. grava nutraĵo orienta - 25. ĉefurbo de norda lando.
Rimarko : Je ekzakta solvo la unuaj literoj de ĉiuj vortoj sinsekve formas proverbon konatan.
Jen la silaboj :
ak - al - al - ap - da - do - du - eb - ed - er - et - fo - go - go - ho - la - lo - ma - na - no- no - no - no - no - nu - of - on - os - os - pi - pi - po - po - re - ri - ro - ro - ro - ro - sa - so - su - te - ti - to - to - tu - vo - zo - zo.
?-?-?-?-?-?-?-?-?-?-?

## ANGULO DE LA ŜAKLUDANTO. (daŭrigo)

4. la turo : moviĝas dekstren kaj maldekstren, antaŭen kaj malantaŭen, sed ĉiam en horizontala aŭ vertikala direkto. Oni povas movi sur tiom da kvadratetoj samtempe kiom oni volas aŭ kapablas (ekz. kiam propra ŝtono staras sur la irota vojo). Oni do tuj rimarkas ke turo kapablas veni sur ĉiuj kvadratetoj de la tabulo.
5. la reĝino : povas moviĝi en ĉiujn direktojn sur tiom da kvadratetoj samtempe kiom oni volas aŭ kapablas.
6. la reĝo : kiel la reĝino sed nur unu kvadrateton samtempe.

-Komenco de la ludado :
a) laŭ ĝenerala internacia konvencio, la tabulo ĉiam kuŝas sur tablo kun nigra angulkvadrateto al maldekstra flanko.
b) la reĝino ĉiam staras sur propra koloro .
c) per la blankaj ŝtonoj komenciĝas la ludado.

-Notado de ŝakludado : kiam oni sidas antaŭ la tabulo, la blankaj ŝtonoj malsupre tiam la tabulo estas markita de malsupre supren de 1 ĝis 8 kaj de maldekstre dekstren de a ĝis h.

-Kiamaniere eviti la ŝakon ?
a) prenante la ŝakdonantan ŝtonon; b) barante la vojon al la reĝo per propra ŝtono; c) forkurante per la reĝo al libera kvadrateto.

-Kiam oni iĝas ŝakmata ?
Kiam nenia de la 3 menciitaj rimedoj plu estas eblaj.

-Kiam ekestas kaj kio estas "Pat" ?
Ekestas kiam la reĝo devas moviĝi (ekz. kiam la ludisto ne plu posedas aliajn ŝtonojn aŭ ke iliaj ŝtonoj estas baritaj) kaj nur kapablas fari tion sur kvadratetoj estritaj de la kontraŭludisto.

-Rimarko : ĉar mankas en tiu kazo la rekta atako (anonco de la ŝako) la ludado estas kun nul-rezulto (remise).

-La aroko : kiam ? Nur unufoje dum ludado. Kiam reĝo kaj turo ankoraŭ staras sur la komencloko (do ne ankoraŭ moviĝis) kaj la faktoj inter tiuj du figuroj ne estas okupitaj nek minacataj de malamikaj ŝtonoj.
kiel ? movigi la reĝon je du kvadratetoj dekstren aŭ maldekstren kaj meti la turon je la alia flanko apud la reĝo. Oni havas la grandan (por la reĝinturo) kaj la malgrandan (por la reĝturo) arokon.

-Kiam la aroko estas malpermesata ?
1. kiam fakete inter turo kaj reĝo estas okupata.
2. kiam reĝo aŭ turo jam moviĝis.
3. kiam la reĝo estas "ŝako" (do oni ne povas aroki por eviti ŝakon).
4. kiam la reĝo devas preterpasi fakaton,minacata per malamika ŝtono, ĉe loko ŝanĝado.
5. kiam oni metus la reĝon "ŝako" arokante.
N.B. Oni ja povas aroki por savi la turon.

(daŭrigota kaj finota)
verkis : Iscrentant Roger.

-:-:-:-:-:-:-:-:-